

Svisa Enciklopedia Planlingva

Unuaj spontanaj reagoj

"Impona enciklopedio pri personoj, organizaĵoj, urboj, iel ligitaj al Volapük, Esperanto, Ido, Occidental-Interlingue, Interlingua; enhavas ankaŭ malgrandan, sed trafite elektitan krestomation de tekstoj rilataj al la temo." (Katalogo de UEA)

"Belega dikega libro nepre havenda por ĉiu svisa esperantisto kaj bonega donaco al nesvisa esperantisto". (SES informas, 2007-1)

"La verko Svisa Enciklopedio Planlingva, en eldono de SES kaj de CDELI, libro preskaŭ 1200 paĝa, kiu estas la frukto de la granda kaj kompetenta laboro de Andy Künzli". (SES informas 2007-2)

"Aperis vere giganta kaj unika enciklopedio, kiu entenas ĉion pri la planlingva movado en difinita lando: La enciklopedio ne nur estas eksterordinara depono de scio sed samtempe monumento por unu el la plej gravaj planlingvaj arkivoj en tutmonda skalo, se ne la plej grava." (IpI 2-3/2007 / D.B.)

"Elkoran dankon pro via Enciklopediego, kiu atingis min antaŭ kelkaj tagoj! Vere mankas al mi taŭgaj superlativoj..." O.B. (Nederlando)

"Koran dankon pro la libreto, kiu hodiaŭ atingis nin! Bela frukto de longega laborado -- gratulon, gratulon, gratulon!!!" A.K. (Ruslando)

"Ĝus mi ricevis la enciklopedion. Ĝi vere estas belega forme kaj enhave. Koran dankon pro via klopodo por la valorega libro al interlingvistiko." L.H. (Ĉinio)

"Via enciklopedio, kiu ĝus alvenis, estas simple eksterordinara. Mi antaŭgustas enplonĝon en ĝian paĝaron kaj ne dubas, ke mi multon lernos." H.T. (Usono)

"Via enciklopedio estas bele skribita." S.B. (CH)

"Mi komprenis - ankaŭ post lego de pluraj partoj - ke vi laboris laŭ historisciencaj kriterioj. Via klopodo resti kiel eble plej objektiva estas tre bone perceptebla en ĉiuj tekstoj kiujn mi legis ĝis nun." R.S. (CH)

"Mi ricevis la Enciklopedion kaj mi trovas ĝin belega. Gratulon." C.S. (CH)

"Gratulojn! Kun granda ĝojo mi ricevis la faman Leksikonon. Ĝi vere estas ĉefverko kaj mi dankas vin pro via entreprenemo kaj antaŭ ĉio pro via insistado daŭrigi kaj fini ĝin kontraŭ ĉiuj malfacilaĵoj. La verko certe ne estas endormigilo - mi legis en ĝi ĝis la unua horo frumatene...! S.B. (CH)

"Gratulegon pro via majesta laboro." R.E. (CH)

"La Svisa Enciklopedio estas ĉefverko de la ĉefverkoj kaj neelĉerpebla fonto de informoj por niaj estontaj historiistoj. La verkinto meritas aplaŭdon kaj dankon." G.F. (Italio)

"La enciklopedio ĝenerale montras redaktan kompetenton, specife en la grafiko, kun eksterordinara bildosortimento..." (HeKo 325, 2-A, 2 mar 07)

"Mi momente ne havas detalajn komentojn krom tio, ke temas pri grava kaj utila verko kaj frandaĵo por ĉiu interlingvisto." V.B. (Germanio)

"Temas pri ege signifa kaj mejloŝtona verko, el ĉiuj vidpunktoj, krome pri modelo por ĉiu lando, kiu devus posedi tian libron." T.C. (Pollando)

"Mi ricevis, kaj iom post iom legas, vian imensan, grandegan laboron. Mi ekspektis grandan verkon, sed ne tiom grandan. Kaj mi imagis science kaj kompetente redaktitan libron, sed ne tiom bele, klare kaj riĉe prezentitan." T.C. (CH)

"Jes, la enciklopedio tre plaĉis ne nur al mi, sed ankaŭ al la mia kunlaboranto" F.G. (CH) |

"La enciklopedion mi admiras (mi povas nur imagi, kiom da laboro enas)." V.B. (Germanio)

"... Estu certaj, ke ni kaj mi persone multon entreprenos por recenzi kaj varbi por tiu eksterordinara verko, vera evento en la historio de interlingvistiko." D.B. (Germanio)

"Hodiaŭ mi ricevis la enciklopedion. Koran dankon. Nu, kia koloso!" G.N. (P)

"Glückwunsch zu Ihrem ganz außergewöhnlichen Buch." B.P. (Germanio)

"En Rotterdam, kie mi ĵus estis, mi iom foliumis en via impona verko." U.L. (Germanio)

"Mi cetere nur povas gratuli pri la bonega kvalito de la laboro." R.P. (Francio)

"Mi deziras gratuli vin pro tiu giganta laboro." M.G. (CH)

"Finfine mi ricevis vian libregon kaj estas tre impresita pro la akurateco kaj detalemo de la informoj en ĝi troveblaj kaj pri ilia abundo. Mi esperas legi recenzojn en la E-gazetaro, ĉar la verko estas modelo pri E-historiografio. Gratulas" G.F. (Italio)

"Mi legas vian libron. Bravo!" A.K. (RUS)

"Mi iam trafolumis vian eksterordinaran Enciklopedion, kiu ja estas verko ege valora kaj grava. Verko laŭ tre interesa, pluralisma vidpunkto. Gratulon al la

esplorinto pro tiom impona interlingvistika verko, kaj ankaŭ pro la science honesta starpunkto pristudi la movadetojn ĉirkau aliaj konstruitaj interlingvoj. (...). bonege. Ĝuste per intelekto altvaloraj esploroj kiel tiu via oni sukcesos atentigi pri la ideo kaj gajni prestiĝon por ĝi. Sincere dirite, mi opinias ke via verko markos historian turnopunkton en la disciplino pri socia historio de la ideoj. Nu, lau tio kion mi legis ewn via svisa enciklopedio, via stilo estas tre rigora kaj tamen facile legebla. " J.A.V. (Ĉilio)

"Impona enciklopedio pri personoj, organizaĵoj, urboj, iel ligitaj al Volapük, Esperanto, Ido, Occidental-Interlingue, Interlingua; enhavas ankaŭ malgrandan, sed trafte elektitan krestomation de tekstoj rilataj al la temo." (UEA-librokatalogo)

"Mi konfesas, ke al mi plaĉis ĉio en la enciklopedio -- preskaŭ neniam mi estis tiel kontenta pri nebeletra libro en Esperanto. Nekredebla rezulto!" K.A. (RUS)

"La nunan verkon karakterizas ne nur pezo kaj diko. La aŭtoro mem verkis la artikolojn en Esperanto, per stilo klara, flua kaj plaĉa. Ĝi estas grava enciklopedio, science ellaborita, zorge redaktita, bele verkita, riĉe ilustrita kaj plaĉe presita. Ne nur pro tia lerta rekreo kaj enetosigo Künzli meritas aplaŭdon. La recenzata verko lin pravas ankaŭ kompetenta historiisto kaj talenta enciklopedia verkisto. Alia menciinda faceto de la aŭtoro estas lia objektiveco. Tial ĉi tiu verko interesas ne nur svisajn esperantistojn, sed la tutmondan adeptaron de la kvin ĉefaj planlingvoj kaj ankaŭ ajnan fakulon aŭ studemulon pri interlingvistiko. Ĝi estas verko kiu ne povas manki sur la breto de ĉiu serioza planlingvano kaj interlingvisto. De nun oni abunde referencos al ĝi kaj nomos ĝin simple *La enciklopedio de Künzli*. Ĝi estos La Verko. La svisa slavisto kaj interlingvisto jam starigis al si monumenton pli daŭran ol bronzo. Tio nomiĝas gloro. Li ĝin meritas." G.N. (P)

"Tiel, eble baldaŭ povos aperi ankaŭ la enciklopedio de Esperanto en Afriko, kiu seeble estu samdika kaj same informriĉa libro kiel la Svisa Enciklopedio Planlingva, elstara verko de Andreas Künzli..." S. K. (CH), el <http://www.liberafolio.org/2007/aferodeespero> plej sube.

"Das Schweizer Plansprachenlexikon von Andreas Künzli ist ein Jahrhundertwerk. Andreas Künzli gehört zweifelsohne zu diesen grossen Idealisten und verdient Dank und Anerkennung für sein ungewöhnliches Werk, das ihm einen Platz in der Geschichte der Interlinguistik sichert." (IntI 61-62/2007) / D.B.)

"Ein großartiges Werk, das auch bei mir im Regal steht und das ich im nächsten Semester in der Arbeit mit Studenten einsetzen werde." S.F. (D)

"Ich danke Ihnen für Ihre Mail und Ihr Angebot, für uns etwas zu dem Thema Plansprachen schreiben zu wollen. Indessen sehen wir im Augenblick keine Notwendigkeit, das Thema aufzugreifen. Ich bitte Sie dafür um Verständnis." R.B. (NZZ)